

Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 75, marto-aprilo 2025



Universala Esperanto-Asocio

Esperanto-parolantoj tra la mondo festis la Tagon de la Gepatra Lingvo



Ege konsciaj pri la homa rajto al lingvo, parolantoj de Esperanto estas fortaj subtenantoj de edukado en la gepatra lingvo kaj la rajto de infanoj komenci sian klerigon en la lingvo kiun ili plej bone komprenas – sia gepatra lingvo. Neniu postrestu pro la lingvo al kiu ili naskiĝis: ĉiuj infanoj havu egalan edukon aliron. Ĉi-jare la 21-a de februaro markis la 25-an datrevenon de la tutmonda festado de la Tago de la Gepatra Lingvo, festo lanĉita de Unesko komence de la nova jarmilo kaj regule markata de Universala Esperanto-Asocio per kunvenoj, festaj aranĝoj kaj specialaj bultenoj.

Laŭ la nunjara mesaĝo, la speciala tago memorigas nin “pri la graveco de lingvoj por persona evoluo kaj socia partopreno, kaj precipe pri la rajto komenci sian lernadon en sia denaska lingvo por povi maksimume sinrealigi kaj maksimume partopreni la socion jam komence de la vivo.”

“Reduktiĝo de lingva diverseco,” la mesaĝo plue asertas, “ofte ligiĝas al redukto de kultura diverseco kaj biodiverseco. Lingvoj portas sciojn kaj spertojn de unu generacio al alia: Lingvoj nin akompanas ĉie kaj en ĉiu ago de la vivo: en la hejmo, en edukado, en politika partopreno, en artoj kaj sciencoj.”

La mesaĝo plue notas “la aktivan partoprenon de UEA en la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032) de Unesko, kiu “celas antaŭenigi lingvajn homajn rajtojn de indiĝenaj popoloj, kaj garantii ke ili povu konservi, revivigi kaj disvastigi la gepatrajn lingvojn.”

Universala Esperanto-Asocio dediĉis sian kongreson de 2022 al tiu Internacia Jardeko. La mesaĝo atentigas, ke “Lingvoj gravas por daŭripova evoluigo kaj por plena partopreno en la socio. Lingvaj demandoj ne ricevis sufiĉan atenton en la ĝenerala debato pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo.”

En 2020 UEA publikigis en Esperanto sian *Gvidilon al la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo* (<https://esperantoporun.org/eo/publikajoj/>). La mesaĝo klarigas, ke “sen efika lingva komunikado la Celoj ne povos plene realiĝi – ĉar lingvoj formas la bazon de komunikado, kaj

dudirekta komunikado estas necesa por komuna laboro: lingvoj estas kaj por paroli kaj por aŭskulti.” Ĝi aldonas: “La Gvidilo substrekas la gravecon de lingvolernado, por maksimumigi dialogon por atingi komunan celon: pacon, prosperon, kaj interkomprenon. Ĝi notas, ke, inter tiuj lingvoj, la ideo malantaŭ la internacia lingvo Esperanto aparte emfazas egalecon, pacon kaj kunlaboron.”

Tutmonda festado de la Zamenhofa Tago

Zamenhofa Tago, la 15-a de decembro, naskiĝtago en 1859 de Ludoviko Zamenhof, kreinto de Esperanto, estas festata tutmonde de la Esperanto-movado. Raportoj pri la ĵusa festado ankoraŭ alvenas el diversaj mondopartoj. Inter la elstaraj: la dumnokta iluminado de la fama statuo de Kristo la Liberiganto (Redemptoro) en Rio de Janeiro, Brazilo, per verda koloro – la koloro de Esperanto.



La statuo Kristo Redemptoro, 38 metrojn alta, verŝajne estas la plej rekonata brazila monumento. Elektita unu el la novaj 7 Mirindaĵoj de la Mondo en la kampanjo de 2007 de la Fondaĵo “New 7 Wonders” (N7W), ĝi situas en la urbo Rio-de-Ĵaneiro (aŭ Rio), sur la monto Korkovado, 710 metrojn alta, pro kies pozicio ĝi videblas de la tuta urbo kaj eĉ de aliaj urboj, kiel la najbara urbo Niterojo.

La lumigo okazis danke al aktivuloj de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro (AERĴ) kaj Niteroja Esperanto-Klubo.

Pri tiu okazo nepras menci la aŭspicion de la Ĉefepiskopo de Rio, lia Kardinala Moŝto Orani Tempesta, kaj la entuziasman subtenon de la respondeculo pri la Sanktejo Kristo Redemptoro, Pastro Omar Raposo. Pro ili, kiuj plene aliĝas al la kompreno, ke Esperanto estas lingvo por kunfratigi la popolojn, tiu agado fariĝis ebla.

Komitato pri Lingvoj traktis indiĝenajn lingvojn

En vigla diskuto ĉe Zoom la 28-an de januaro 2025, preskaŭ 200 homoj el pli ol 30 landoj (kaj reprezentantaj multajn lingvojn) kunvenis en Rondtabla Diskuto pri Indiĝenaj Lingvaj Rajtoj organizita sub aŭspicio de la Komitato de NROj (neregistaraj organizoj) pri Lingvoj, t.n. substanta komitato de la Konferenco de NROj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj (CoNGO). La kunvenon prezidis prof. Francis M. Hult (Universala Esperanto-Asocio), prezidanto de la Komitato.

La partoprenantoj venis el vasta gamo de interesoj, inkluzive de instruistoj de indiĝenaj lingvoj, gvidantoj de indiĝenaj komunumoj, universitataj profesoroj, fakuloj pri juro, komunumaj organizantoj, kaj reprezentantoj de internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizoj.

La Ronda Tablo prezentis sep ĉefajn diskutantojn. Vital Bambanze, el Burundo, membro de la Konstanta Forumo de UN pri Indiĝenaj Demandoj; Leslie Harper, de la Oĝibŭa Nacio,

programdirektoro de la usona Nacia Indiĝenamerika Resursa Centro; Hanna-Maret Outakoski, profesoro de la Samia Universitato de Aplikaj Sciencoj; Jaco du Toit, Estro de Universala Aliro al Informoj kaj Diga Inkluzivo, UNESKO; Anton Treuer, profesoro de la Ŝtata Universitato Bemidji, Usono; Barbara Grudell, ĉefkonsilisto pri Afrika Lernado kaj Evoluigo, SIL; kaj Hernan Vales, el Argentino, estro de la Sekcio pri Indiĝenaj Popoloj kaj Minoritatoj en la Oficejo de la Alta Komisionestro de UN pri Homaj Rajtoj. La prezidanto de la Komitato de NROj pri Lingvoj, prof. Francis Hult, prezidis, kaj profesoro Humphrey Tonkin, vicprezidanto, prezentis konkludajn rimarkojn.

1. Multaj lingvoj kiujn oni nomas indiĝenaj estas uzataj de malgrandaj nombroj de homoj ene de pli grandaj ŝtatoj kies oficialaj lingvoj estas aliaj, aŭ de popoloj kiuj transas landlimojn. Tra la historio, oni ofte ekskluzivis tiujn homgrupojn el plena politika, ekonomia kaj kultura partopreno.
2. Konvinki naciajn registarojn, ke ili atentu tiujn minoritatojn, kaj ke ili liveru al ili necesajn rimedojn (por edukado, por kultura konservado, por konservi kaj plifortigi ekonomian vivipovon) estas malfacile. Kie landlimoj dividas tiujn komunumojn, estas aparte defie, ke oni redirektu rimedojn kaj harmoniigu politikojn por rekte fronti realajn bezonojn.
3. Tiaj problemoj aparte akutas en mondopartoj kie ekzistas altaj niveloj de lingva kaj kultura diverseco, kiel ekzemple la afrika kontinento.
4. Kvankam demandoj de lingva diverseco kaj lingva konservado estas konsiderataj gravaj en certaj regionoj kaj landoj de la mondo, en aliaj regionoj kaj landoj ili ricevas malmultan atenton fare de registaroj. Sekve, estas malfacile krei interkonsenton kiu konduku al tiurilata agado, eĉ en internaciaj organizoj kiel Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj.
5. Internaciaj iniciatoj kiel ekzemple la Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj deklarita de Unesko (2022-2032) helpas per tio, ke ili konsciigas pri lingvaj demandoj, fortigante kunlaboron kaj stimule lokajn programadon kaj rimedojn. Tiaj iniciatoj videbligas lingvajn rajtojn, ĝeneralan rekonon de lingvado kiel homa rajto, kaj konscion pri la malekvilibro de potenco inter lingvoj pro historiaj, sociaj aŭ politikaj kialoj.
6. Lingvado estas tiel fundamenta homa aktiveco, ke oni ofte senpripense akceptas ĝin. Pro tio, lingvoj estas plejparte ignorataj en la Celoj por Daŭripova Evoluigo (oni mencias lingvajn demandojn pasante en CDE 4, sed tute ne en CDE 16 – kaj en neniu alia loko en la Celoj). Sed realo estas, ke la lingvo estas absolute fundamenta al homa kunlaboro kaj sekve al la CDE kiel tuto: ĝi estas samtempe ĉie kaj nenie.
7. Por facile kaj rekte esprimi la aferon: lingvo estas partopreno – kaj ne nur parolado per lingvoj sed ankaŭ aŭskulti per lingvoj. Lingvaj minoritatoj havas en sia posedo unikajn verojn kiujn ili povas alporti subtene al kunlaboro, se ni pretas aŭskulti.
8. Surkampaj laborantoj kaj lingvaj fakuloj povas multon lerni per divido de plej bonaj praktikoj, per ekzamenado de lingvaj politikoj, kaj per kunigo de diskursoj en spirito de kunlaboro kaj flekseblo. La Jardeko kaj aliaj internaciaj iniciatoj helpas stimuli tian kunlaboron, kiel ankaŭ faras aranĝoj kiel la nuna Ronda Tablo.

Inaŭguran Premion Grégoire Maertens ricevis Stela Besenyei-Merger

La nove lanĉita Premio Maertens celas premii esperantistajn organizaĵojn aŭ individuojn, kiuj per siaj realigoj grave kontribuis kaj plu kontribuos al la evoluigo de la Esperanto-movado. Pri la ricevantoj de la premio decidas komisiono konsistanta el eksaj prezidantoj kaj estraranoj de UEA. La Premion oni iniciatis en la jaro 2024 honore al la centjariĝo de Grégoire Maertens, prezidanto de UEA en la jaroj 1980-1986 kaj daŭre aktiva esperantisto ekde la Dua Mondmilito. Inter liaj fruaj agadoj: akompani junan esperantiston George Soros al junulara Esperanto kongreso en Ipswich, Britio. Soros poste restis en Britio kaj komencis sian karieron kiel financisto.

La Premio Grégoire Maertens en la nuna inaŭgura jaro 2025 estis aljuĝita al **Stela Besenyei-Merger** pro ŝiaj originalaj, inspiraj kaj plurflankaj kontribuoj al la organiza kaj kultura vivo de la Esperanto-movado.

Stela Besenyei-Merger estas denaska esperantisto, filino de franca patro kaj hungara patrino. Ŝi estas unu el la plej famaj denaskuloj ekster la Esperanto-movado, pro mallonga sinprezenta [video](#) kun subtitoloj, farita en 2020 sub la aŭspicio de *Wikitungues*, kun pli ol 800 mil spektantoj ĝis nun. Ŝi ankaŭ notinde kontribuis al la dokumentado de la denaskula fenomeno per serio de podkastaj intervjuoj kun denaskuloj kaj ties gepatroj, troveblaj en ŝia [blog](#) “Stela ĉiam nur kritikas” kaj en ŝia [retejo](#) “La bona renkontiĝo” (<https://www.laboren.org/>) – esplora kaj eduka laboro, kiu ankoraŭ daŭras.

Stela kreskis en movada medio, partoprenante familiajn kaj junularajn renkontiĝojn jam ekde sia naskiĝo. Ŝia plej frua organiza kontribuo, kiel ŝi rakontas, estis – nur sesjara – instrui origamion al infanoj kaj plenkreskuloj. Ŝiaj multjaraj spertoj pri Esperanto-aranĝoj, kiel partoprenanto kaj organizanto, fine konvinkis ŝin krei unikan konsilaron por organizantoj en la formo de [podkasta serio](#) nomita “La bona renkontiĝo”. En la jaroj 2017 kaj 2018 ŝi publikigis dudekon da tiaj duonhoraj epizodoj, kiuj – laŭ la vortoj de tiu, kiu rekomendis ŝin por la premio – “disponigas utilegajn rimedojn por organizaj teamoj je ĉiuj niveloj, de novaj volontuloj ĝis spertaj organizantoj”.

En aprilo 2021 Stela aliĝis al la teamo de literaturamantoj nun konata kiel [Bobelarto](#). Komence helpante pri la organizado de la unua eldono de la Interkultura Novel-Konkurso (INK), ŝi konstruis sur siaj antaŭaj spertoj, gvidante verkeseiojn kaj legosalonojn kaj kreante podkastan serion kun diversvoĉa laŭtleĝado de elektitaj konkursaĵoj.

Sekvis enkonduko de Movada Verk-Monato ([MoVeMo](#), ekde novembro 2021), [Literatura Duonmaratono](#) (tago de literaturaj eventoj, ekde marto 2023) kaj la retaj [Verk-Semajnoj](#) (ekde aprilo 2024). Tiuj iniciatoj helpis krei unu el la plej viglaj kaj kulture aktivaj komunumoj de esperantistoj en la reto, malfermante novan fazon en niaj legaj kaj verkaj tradicioj.

UEA funebras la forpason de amata aktivulo kaj iama prezidanto

Kun granda bedaŭro la Esperanto-movado eksciis pri la morto, en Londono la 1-an de februaro, de Renato Corsetti, 83-jara, iama prezidanto (2001-2007) de Universala Esperanto-Asocio, lastatempe nomita kiel ĝia honora prezidanto. D-ro Corsetti, ekonomo kaj lingvisto, lernis Esperanton en la 1960aj jaroj kaj baldaŭ ekaktivis en la internacia Esperanto-movado, unuflanke kiel ano de itala Esperanto-kabaredo kaj poste kiel prezidanto de TEJO, la tutmonda junulara Esperanto-organizo. Poste li okupis multajn gvidajn postenojn, interalie la prezidantecon de la Itala Esperanto-Federacio.

Kiel prezidanto de UEA li estis forta pledanto por kolektiva desuba agado kaj por la engaĝiĝo de Esperanto-parolantoj en la kampanjo por homaj rajtoj. Dum multaj jaroj li estis profesoro pri psikolingvistiko en la Universitato La Sapienza, en Romo. D-ro Corsetti argumentis, kiel ano de la Akademio de Esperanto, ke oni tenu Esperanton simpla kaj facile lernebla. Post emeritiĝo li kaj lia edzino Anna Lowenstein translokiĝis al Londono, kie li restis aktiva en la loka Esperanto-movado kaj ankaŭ tutmonde. Lia voĉo estis aparte influa en la Esperanto-movado en Afriko kaj en la studado de Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj. Li ankaŭ vigle subtenis la laboron de Universala Esperanto-Asocio en Unuiĝintaj Nacioj.

Oni forte sentos lian mankon.